



LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

Eldonata je la nomo de l' Klubo Esperantista en Upsala.

Kosto de abono por jaro: Skandinavaj kronoj 4,00 = germanaj markoj 4,50 = frankoj 5,75 = rubloj 2,00 = portugalaj rejsoj 1000 = brazilaj rejsoj 2000 = aŭstro-hungaraj kronoj 5,50 = dolaroj 1,25 = ŝilingoj 4 ½.

Pago por anoncoj: 15 oeroj = 15 pfenigoj = 20 centimoj = 8 kopekoj = 20 heleroj, por duonpaĝa petittinio. — 10% rabato por duonjaraj, 25% rabato por tutjaraj anoncoj. Ĉe granda anoncado ankoraŭ pli da rabato laŭ reciproka konsento.

Adreso de l' redaktoro: PAUL NYLÉN, UPSALA, Sverige (Svedujo).

Adreso de l' administrado: Presejo de PAUL DE LENGYEL, SZEGZÁRD, Magyarország (Hungarujo).

Kun manuskriptoj kaj ĉio tuŝanta la tekston oni sin turnu al la redaktoro; pri abono, ekspedado, anoncoj kaj ĉiuj monaj aferoj oni devas turni sin al la presejo.

Al la legantoj de la L. I.

En la pasinta jaro, kiel scias niaj legantoj, nia gazeto la „Lingvo Internacia“ — pro teknikaj malhelpaĵoj — neregule eliradis el la ekspedejo. La lasta numero, kiu estis datita je la 31-a de decembro 1899, eliris en la fino de marto 1900.

Post eliro de tiu numero la redaktoro konfidis la nunan administranton je la presado kaj dissendado de l' gazeto. La nuna administranto komencis do sian laboron kun heredita kvaronjara malfruo.

Ankaŭ nun ruliĝas malfacilaĵoj antaŭ la plej regulan eliradigon de la L. I., ĉar la redaktoro kaj administranto loĝas en malproksimaj landoj unu de la alia; sekve ilia interkomunikigo postulas ĉiam pli grandan tempon.

Tamen ni decidis, ke ni klopodos atingi la regulan aperan tempon antaŭ la fino de tiu ĉi jaro. Por efektivi tiun ĉi intencon ni decidis la sekvantajn.

Komencante de nia antaŭa (3) numero la L. I. ampleksas 20 paĝojn antaŭ 16, kaj ni elirigos ĝin entute 10 fojojn en la jaro 1900 anstataŭ 12. Tiamaniere la plena jarkolekto estos sama tiel ampleksa (192 paĝoj). La nuna numero de nia gazeto portas la numerojn 4—5 (april—majo), la sekvonta la numerojn 6—7 (junio—julio); post kelkaj monatoj estos do jam atingita la regula tempo.

Ni pensas, ke niaj estimataj abonantoj ne havas ion kontraŭan pri nia jena aranĝo, per kiu ni intencas relevi nian gazeton sur tiun nivelon, kiu estas preskaŭ la ĉefa kondiĉo en la vivo de ĉiu rimarkinda gazeto.

Upsala) en julio 1900.
Szegzárd)

La redakcio kaj administrado
de la L. I.



Klubo Esperantista en Stockholm.

La Klubo Esperantista en Stokholmo kun la komenco de tiu ĉi kvaronjaro startis la trian jaron de sia ekzistado.

Se oni ĵetas rigardon al tiuj ĉi pasintaj jaroj kaj esploras kion ili portis kun si por la klubo, oni sentas kaj ĝojon kaj nekontenton: ĝojon, ĉar tre multe estis, en tiu ĉi tempo, farita por l'akcelo de la Esperanta afero tie ĉi, parte per privata propagando de klubaj membroj, parte per interesigaj notizoj kaj artikoloj en la gazetaro pri la klubo kaj ĝia efikado; nekontenton, ĉar estis ne farita tiom, kiom estis ebla fari.

Tio ĉi grandparte dependas de la cirkonstanco ke la klubestraro, okupita de siaj metiaj devoj, per si mem premegantaj, kaj malhavinta la necesegan financan rimedon, ne — malgraŭ la plej granda bonvolo — povis trovi eblon laboradi por la afero tiel, kiel dezirinde, sed parte ĝi ankaŭ dependas de ia inercio ĉe la plimulto de la klubanoj.

Post kompare viveca aliĝo, kiu komencis sekvi post la publika prezentiĝo de la klubo, estiĝadis stato de reakcio. Multaj aliĝintoj pro scivolemeco aŭ espero trovi ion, kion ne povis oferi al ili la klubo, estis sin detirantaj se ne el la klubo, tamen el ĝiaj kunvenoj, kaj restis en ĝi nur per la nomo, sen partopreni . . . almenaŭ videble . . . en la klubala laborado. Eĉ tio, kio devis esti por ili la ĉefa motivo de aliĝo, la lingvo, fariĝis por granda parto konata ĝis . . . la nomo, sole!

La laboro de la klubo ankaŭ dum tiu ĉi tempo ne prezentis ion de publika intereso; la faroj entreprenitaj ĉefe koncernis aferojn de loka naturo.

Kun la komenco de tiu ĉi jaro, dume, la cirkonstancoj ŝanĝiĝis per la fakto ke la klubo ricevis sumon da novaj indegaj fortoj, kiuj . . . tio ĉi estas akcentinda . . . aliĝis al la klubo pro Esperanto, kaj en la sveda Esperanta movado la klubo peniĝas ĉiam pli okupadi la ĉefan lokon, kiu rajte devas troviĝi en la ĉefurbo de la lando.

La 6-an de marto lasta la klubo havis elekton de estraro por la jaro estanta, — kaj estis tiam elektataj: kiel klubestro, doktoro E. Etzel anstataŭ inĝeniero F. Langlet, kiu, ŝarĝegata per laboro je la okupo de sia profesio, estis devigita rifuzi novan mandaton; kiel kasisto, redaktoro A. Roswall (reelektita); kiel sekretario, policisto P. Ahlberg (reelektita), kaj kiel supleantaj membroj de la klubestraro: sinjorinoj E. Krikortz (reelektita) kaj Louise Fraenckel.

Je tiu ĉi kaj la sekvinta kunveno, la 27-an de aprilo, la klubo traktis prezentitan de redaktoro Paul Nylén projekton de Esperanta societo, ampleksonta la skandinavajn landojn kaj Finlandon, kun propra gazeto, laŭ la modelo de la franca societo por la propagando de Esperanto.

La plej grava en la projekto estas ĝia dismeto de la societanoj en tri kategoriojn: aprobantoj, adeptoj kaj propagandantoj. En la unua kategorio estas metataj la personoj, kiuj, sen lerni Esperanton, tamen aprobas la celon de la societo kaj volas partopreni en ĝi per la membropago. La dua kategorio konsistas el personoj sciantaj la lingvon Esperanto; kaj en la trian kategorion . . . la elit-kategorion . . . estas metataj tiuj adeptoj kiuj altiris 5 membrojn al la 2-a kategorio aŭ 10 mem-

brojn al l'unua, — aranĝo, per kiu estos ebligata la plena uzado de ĉiuj fortoj.

La propono, kiu vekis senesceptan aprobon, kaŭzis vivan diskusion. Oni almontris la grandan elvolviĝon de la Esperanta afero post la publikigado de la nova sveda lernolibro. Precipe en Svedujo kaj Finnlando la progresoj estis grandiozaj. Sed la esperantistoj laboradis senkontakte, disigitaj ĉie en la nordeŭropaj landoj, kaj tial estis necese kolekti ilin en unu grandan koncentraĵon, kiu povus agadi kun tia forto kaj energio, kian nur povus efektiviĝi la unuiĝo. Al la multnombraj esperantistoj en Finnlando precipe, kie la rilatoj ne estis favoraj por ia kluba agado, povus tia granda societo etendi helpan manon unuigante, kiel ankaŭ al la norvegaj kaj danaj esperantistoj. En Norvegujo la afero dum la lasta tempo ŝoviĝis antaŭen en maniero tre esperiga, spite la staton de izoleco, sub kiu sin trovis la tieaj esperantistoj. Nun ili bezonus la helpon, kiun nur povas doni tia granda societo, se la Esperanta afero ne riskus la saman sorton tie kiel en Danujo. La viveca kaj forta movado, kiu en la laste nomita lando antaŭ kelkaj jaroj manifestiĝis, certe estus ebla vivigadi kaj elvolviĝi, se ĝi havus la apogon de skandinava societo Esperanta. Ekzistas, plue, grandaj internaciaj unuiĝantaraj pro diversaj celoj, kies membroj ne posedas la lingvon unu de l'alia: se tia ligo estus adoptanta la Esperantan lingvon, ĝiaj membroj plifacile povus ekkomunikiĝi kun esperantistoj, se tiuj ĉi estus kunigitaj en unu grandan aron. Estus ankaŭ tre grava la konformeco inter la regularoj de la diversaj lokaj kluboj.

Se ĉiuj do interkonsentis pri la dezirindeco de tut-skandinava societo Esperanta, la opinioj iom diferenciĝis koncerne

la manieron ĝin formi. Je unu flanko oni elparolis la supozon ke se ni tie ĉi en Stokholmo estus nun konstituigontaj skandinavan societon sen antaŭa interkonsiliĝo kun la koncernaj diverslandaj esperantistoj, tiuj ĉi estus kondukotaj al la entrepreno suspekta. Tial oni unue devus komunikiĝi kun ili kaj, se eble, akiri ilian partoprenon en la antaŭpreparontaj laboroj. Se tio ĉi ne estus ebla, oni opiniis ke estas pli saĝe komence formi esperantan societon svedan.

De l'alia flanko oni opiniis ke la danĝeroj ne estas tiel minacantaj: niaj parencaj popoloj certe ne sentus sin ofenditaj pro tio, ke ni ankaŭ al ili pensis kiam ni pretigas la societon. Esperanto estas farita por ĉiuj, ĝi estas rimedo, kiu esperas atingi kiel eble plej multajn kaj estas sufiĉa por ĉiuj; tiel same la prezentita projekto sin turnas al ĉiuj en la skandinava mondo Esperanta. Ĝi estus kvazaŭ vestaĵo, kiun oni estus pretiganta antaŭe kaj tiel vasta, ke ĝi sufiĉu al ĉiu, kiu volus sin per ĝi vesti. Cetere estus malfacile ekzistigi ian eldiron el la flanko de la ekstersvedaj esperantistoj, kiu povus esti konsiderata signifi la opinion de la plejmulto, ne estante en tiuj ĉi landoj ia korporacio Esperanta.

Kontraŭ tiu ĉi opinio prezentigis la objekto, ke estas ne tute prudente pretigi vestaĵon, grandan kaj vastan, antaŭ ol oni havas korpon en ĝin enŝtopi. Tial oni devus antaŭe formi Esperantajn klubojn en la diversaj lokoj en Svedujo kaj poste unuigi ilin en unu komunan societon. Kiam la cirkonstancoj en la ceteraj landoj tiel same estos elvolviĝintaj, tiam estos tempo fondi skandinavan esperantosocieton. Oni devus konstrui el la fundo supren, ne de l'supro malsupren. Invito

al la esperantistoj en tiuj ĉi landoj aliĝi al sveda societo sendube komprenigus al ili la gravecon de propraj lokaj unuiĝoj kaj tiel rapidigi la Esperantan elvolviĝon tie.

Krome oni opiniis ke estus nekonvene jam el la komenco aperiĝi kun la pretendo kaj eĉ eble iel ofenda al la aliaj landoj nomo „Skandinava“. Pli bone estus anstataŭigi ĝin per la nomo „nord-eŭropa“ (*nordisk*), kia nomo ne estus supoziganta ian etnografian limigon. En tia societo loĝantoj en la tuta norda parto de Eŭropo povus eniri, dume en skandinava societo eĉ svede parolantaj finnoj ne sentus sin hejme.

Kontraŭ la demando pri lokaj kluboj kiel kondiĉo de sveda aŭ nordeŭropa societo esperantista estis prezentata la objekto ke estus malfacile kunigi la dise loĝantajn esperantistojn en lokajn unuiĝojn, ĉar multaj el ili loĝas en la provincaro, eksterurbe, kie estus malfacile, eĉ neeble, ekzistigi lokajn societojn pro manko de sufiĉa nombro da personoj interesigeblaj por la afero. Por tiuj esperantistoj do unuiĝantaro kun komuna centra administrado estus de grandega utilo. Koncerne tiun ĉi demandon, kiel aliajn idealajn, oni povus diri, ke la intereso estas ondoforma: dum kelka tempo homo povas esti interesata de l'afero, sed poste ĝi estis iel forŝovita flanken kaj bezonas instigon. Tia instigo estus ricevebla per la membreco en ia granda societo ile la gazetaj ekzempleroj, cirkuleroj k. t. p., kiujn ĝi tempon post tempo estus dissendanta al siaj membroj. Konfesinde, lokaj unuiĝoj havas grandan indon, sed kiu ilin iniciatus? Por tio estas postulata tia intereso kia ne ĉiam kaj ĉie ekzistas.

En la diskusio ankaŭ estis ekzaminata la influadon, kiun povus igi al nia

komuna gazeto . . . Lingvo Internacia . . . la societo kaj ĝia eventuala gazetorgano. Oni opiniis ke la intereso por tiel granda societo estos ensorbanta tro multe da forto, kaj tiel povus damaĝe influadi al la plej grava rimedo por la kuntenado de la esperantistoj kaj la elvolviĝado de l'afero Esperanta, nome Lingvo Internacia kaj la propagando, kiun solan ĝi povus efektivigi. Kiel argumento por tiu ĉi opinio oni prezentis ekzemplon el la france parolantaj landoj. Antaŭe, kiam la Esperanta movado estis malmulte disvastigita en Francujo, oni tre ofte vidis francajn nomojn en la Esperanta centra organo, dum nuntempe tia vidaĵo estas „événement“, kaj la gazeto havas rimarkinde malmultajn abonantojn en tiu ĉi parto de la Esperanta mondo, kvankam la afero tie ĉirkaŭ sin kolektis grandegan nombron da anoj.

Al tio ĉi estis rimarkata ke tiuj malfacilaĵoj, kiuj estis konsiderataj kiel estonta sekvo de la starto de l'societo, jam de longe ekzistadis. La Klubo Esperantista en Upsalo, efektive, laŭ la utilo . . . kvankam ne laŭ sia nomo . . . estadis tia societo kiel la projektita. Ĉiutage al la klubo estis venantaj mendoj kaj demandoj pri informoj el ĉiuj partoj de Svedujo kiel ankaŭ el Finnlando kaj Norvegujo. Krom tio ĉi la klubo ankaŭ zorgis pri la gazeto Lingvo Internacia.

En la espero fondi dismeton de tiuj ĉi la klubon premegantaj laboroj al plimultaj manoj kaj almenaŭ transigi la korespondadon kaj la librokomercon de sur la ŝultroj de la Upsala klubo, la proponanto prezentis sian projekton. Ĉar la gazeto pensita devus esti kvaronjara folio, dediĉota al la societanoj por ilia membro-pago, ĝi ne povus fariĝi danĝera al la Lingvo Internacia kiel konkuranto.

Ekfininte la diskusion, la klubo unuvoĉe fiksas la sekvantan rezolucion:

„Stockholms Esperantoförening uttalar sig för önskvärdheten af en sammanslutning mellan esperantisterna i de nordiska länderna.“

La Klubo Esperantista en Stokholmo elparolas la dezirindecon de unuiĝo de la esperantistoj en la nordeŭropaj landoj.

En la diskusioj partoprenis inter aliaj: la prezidanto de l' „Independent order of goodtemplars“ en Svedujo, parlamentano en la Riksdag s-ro V. Styrlander el Sollefteå, la redaktoro s-ro Paul Nylén el Upsalo, la prezidanto de l' Klubo Esperantista en Upsalo, ĵurnalisto s-ro Valdemar Langlet, la redaktoro de „Hjulsport“ s-ro A. Roswall, la doktoroj E. Etzel kaj S. E. Krikortz, bankoficisto C. E. Carlsson, ĉiuj en Stokholmo.

Je la 25-a de majo la klubo havis sian lastan ordinaran kunvenon de tiu ĉi semestro.

En tiu ĉi kunveno, prezentita propono pri aliformigo de la regularo de la klubo estis akceptata favore, kaj komisiis la klubo la klubestraron entrepreni dum la sekvanta somero laŭ sia bontrovo la necesajn por tiu ĉi celo antaŭlaborojn kaj en la sekvonta kunveno, post la somera sezono, prezenti antaŭ la klubo la rezulton de sia laboro.

En la kunveno je la 27-a de aprilo la klubo unuvoĉe elektis kiel vic-prezidanto la bankoficiston s-ron C. E. Carlsson.

Stokholmo la 29-an de majo 1900.

P. Ahlberg,

sekretario de l' Klubo Esperantista en Stokholmo.



KRONIKO.

El Svedujo.

— N^o 107 de la gazeto „Ny Tid“ (10. V.) sciigas, per malgranda noteto, pri L. I.

*

— „Hjulsport“ parolas en N^o 18 (3. V.) sub la rubriko „Literaturo“ pri nia gazeto, kies novan aperaĵon ĝi laŭdas kaj rekomendas.

En la kokerio de N^o 19 de tiu sama gazeto (10. V.) Esperanto estas serĉe nomata kaj citata.

*

— En „Aftonbladet“, N^o 139 (18. VI.) estas enpresita, sub la rubriko „Arto kaj literaturo“ kaj la subrubriko „Nova universala lingvo“, sufiĉe longan artikolon — recenziion pri la „lingvo blua Bolak“, al kiu la verkinto (kiu subsignas sin „S“) dediĉas kelkajn vortojn da kritiko. Parolante pri la fonetika flanko kaj trovinte tie malkonsekvencojn la verkinto skribas: „La aŭtoro (de Bolak) devis eble preferi, antaŭ ol li pensis pri universala lingvo, esti en lernejo ĉe siaj samlandanoj s-roj Paul Passy kaj abato Rousselot.“

El la fino de la artikolo ni citas la sekvantan: „Apenaŭ estas kredeble, ke tiu ĉi nova universala lingvo akiros iel pli grandan aliĝon ol la plejmulto da ĉiuj antaŭrintaj provoj. Tiu, kiu ŝajnas havi por si la plej bonan eblecon kaj ŝancon, estas nuntempe Esperanto... Estas strange, ke simile kiel la provo solvi la problemon de ia „perpetuum mobile“ — maŝino, kiu, unufoje ekmovita, daŭrigos sinmovadi en eternaj tempoj — senĉese aperadas, tiel rilatas ankaŭ tiaj pasilingvaj aŭ universallingvaj provoj. Tamen

tiuj ĉi lastaj sendube estas pli proksimaj al la ebleco de efektiviĝo.

*

— En „Helsingborgs Dagblad“ s-ro Henning Norin en Perstorp presigis la svedan tradukon de diversaj partoj el la „Libro de l'Humorajo“ de Paul de Lengyel. En la numero je la 8-a de marto lasta estis legata la noveleto, rubrikita „Poste restante“, komunikis al ni s-ro N.

*

— Monofero. Fraŭlino Hilda Cederblad havis la bonecon donaci por la kaso de la gazeto L. I. la sumon da 60 sved. kron. Por tio la plej koran dankon!

*

El Francujo.

— Grupo Esperantista Pariza. La plej grava kaj interesa sciigo, kiun ni ricevis el Francujo dum la lasta tempo, estas pri tiu ĉi nova klubo, nomata Grupo Esperantista Pariza. Tiu ĉi fondo estas la frukto de la tre serioza kaj tre agema propagando de l' estimataj apostoloj Esperantistaj en la mondurbo. Antaŭ aŭdantaro da gazetistoj s-ro Gaston Moch faris paroladon, la 31-an de marto. La 25-an de aprilo s-ro de Beaufront paroladis al esperantistoj en Parizo. Ĉe la scienculoj s-ro Méray senlace kaj sukeese propagandis. En la Societo de Scienculoj s-ro de Beaufront, laŭ la invito de ĝia prezidanto s-ro C. A. Laisant, faris longan komunikon pri Esperanto en la kunveno de tiu societo la 25-an de majo. „Ni estas“, diras pri tio ĉi L' Espérantiste, „tre feliĉaj konstati pli kaj pli ke la sciencularo, precipe en Francujo, rigardas Esperanton kiel tre grandvaloran penson, kaj ŝatas la servojn kiujn nia lingvo povas fari al ĉiuj en la scienca kampo.“

Post du kunvenoj preparaj, faritaj la 31-an de majo kaj la 8-an de junio, en la Lernejo de la Gazetistaro, la Grupo Esperantista Pariza estis difinitive fondita. Ĝi estas organizita laŭ regularo tre simpla, tute konforma al la programo difinita de la S. p. p. Esperanto. Laŭ la paragrafo 1-a de la regularo, ĝia celo estas: 1-e. Lernadi komune Esperanton kaj perfektigi en la konado pri la lingvo per la interparolado kaj la legado de l' verkoj de la biblioteko grupa; — 2-e. Helpi por la propagando de Esperanto en Parizo, organizante paroladojn aŭ kursojn (fari-tajn de profesoroj aprobitaj de la S. p. p. Esperanto) aŭ subtenante finance aŭ morale propagandajn entreprenojn, aŭ per ĉiu alia rimedo kiun oni juĝos taŭga; — 3-e. Akcepti la eksterajn esperantistojn pasantajn en Parizo.

En la kunveno de la 8-a de junio estis faritaj la sekvantaj elektoj:

Honoraj membroj:

Doktoro L. Zamenhof.

S-ro Louis de Beaufront.

Generalo Sebert, membro de l' Akademiaro Franca.

Membroj de la Komitato:

S-roj Gaston Moch, verkisto, Prezidanto,

— Gabriel Chavet, studento, sekretario-kasisto.

Fr-ino Alice Roux, profesorino.

S-roj Edmond d'Eyssautier,

— Jean Fréhis,

— C. A. Laysant, doktoro de sciencoj,

— J. Naybar, honora profesoro,

— E. Tarbouriech, doktoro de leĝoscienco,

— Paul Tenneson.

Ĉiujn komunikadojn oni provizore sendu al la sekretario-kasisto s-ro Gabriel Chavet, 125, Boulevard Saint-Michel, Paris.

*

— Esperanto en la Ekspozicio de 1900. Esperanto estas prezentata en la Sekcio Rusa de la Palaco de l' edukado kaj instruado. Niaj francaj amikoj klopodos por aranĝi, se estas eble, kelkajn paroladojn pri Esperanto dum la Ekspozicio kaj en la Ekspozicio mem. Krom tio, por konigi pli multe nian lingvon en la sciencularo, ili intencas prezenti raportojn pri Esperanto en kvin kongresoj malsamaj: en la Kongreso Medicina, en la Kongreso de l' instruado pri la lingvoj vivantaj, en la Kongreso Filozofia, en la Kongreso de la Matematikistoj kaj en la Kongreso de la Instruista gazetistaro.

*

— Kunvenoj dum la Ekspozicio. La *Societo por la propagando de Esperanto* invitas ĉiujn esperantistojn estantajn en Parizo dum tiu ĉi somero por kunveni en la tagoj sekvantaj:

La sabato, 21-a de julio.

La ĵaŭdo, 9-a de aŭgusto.

La ĵaŭdo, 6-a de septembro.

En ĉiu el tiuj ĉi tagoj: vespermanĝo je la 1/2 de la 8-a horo, en la restoracio de la Hôtel des Sociétés Savantes, 8, rue Danton (Hotelo de la Societoj sciencaj, strato Danton N° 8). — Enpago: 5 frankoj (= 2 rubl.) por ĉia persono. — Oni estas petata enskribigi sin kaj sendi sian enpagon plej frue kiel eble, kaj ne pli malfrue ol kvin tagoj antaŭe. Oni sin turnu por tio al la sekretario de la S. p. Esperanto, kiu sendos returne karton de akcepto. Lia adreso: s-ro René Le-

maire, sekretario de la S. p. Esperanto, en Epernay (Marne), Francujo.

Estos ricevataj ĉiuj kiujn interesas nia afero, societanoj aŭ ne, sciantaj Esperanton aŭ ne. Pli da detaloj oni povas vidi en la n-ro maja de L'Espérantiste.

*

— Internacia Korespondado Esperanta (I. K. E.) estas aranĝo en la gazeto „L'Espérantiste“, kies celo estas faciligi la leteran interkomunikon de la membroj adeptoj aŭ propagandantoj de la S. p. Esperanto. Sub difinitaj kondiĉoj kaj laŭ speciala regularo, publikigitaj en la n-ro aprila de la dirita gazeto, tiuj membroj povas enpresigi sian nomon, adreson k. c., per tio akceptante la rajtojn kaj devojn de la I. K. E.

*

— La gazetistaro. Oni sendis al ni la n-rojn 854 kaj 856 de la medicina gazeto „Journal de la Santé“, kiuj enhavas serion da artikoloj pri Esperanto, verkitaj de s-ro Henri Bel, kiu talente prezentis nian lingvon al la kuracistoj.

*

El Bulgarujo.

— El Tirnovo, Dol.-Orehovitza, s-ro H. Popov skribis al ni la sekvantan:

„La 13. V. t. j. mi havis publikan paroladon en Tirnova legejo antaŭ la plej elektita publiko da 50—60 sinjorinoj kaj 150 viroj.

Mi parolis pri la historia alkresko de l'ideo krei unu lingvon internacian de Leibnitz ĝis nun, kalkulinte ĉiujn projektojn ĝis nun.

Post la parolado mi disdonis kraĵonetojn kaj paperojn, tradonis kelkajn regu-

lojn de la gramatiko Esperanta, kaj Vi prezentu al Vi, kun kia entuziasmo la publiko aplaudis Esperanton kaj D-ron Zamenhof, rigardante, ke oni en mia apud-esto povis jam skribi frazojn Esperantajn.

Esperanto tre bone sukcesas en mia patrujo.“

La 21-an de tiu sama monato s-ro Popov faris ankoraŭ paroladon pri tiu sama temo kun egale granda sukceso kaj vive aplaudita.

*

El Rusujo.

— La societo „Espero“ en S. Peterburgo elsendis dum tiu ĉi printempo du cirkulerojn en la intenco interesigi rusojn pri Esperanto kaj precipe pri la partopreno de l'Espero en la Pariza Ekspozicio. Unu el la cirkuleroj, kiu estas presita, estis adresita al la rusaj esperantistoj; la alian, kiu estas hektografita sur tri paĝoj de granda folio, la Societo adresis al la redaktoroj de rusaj gazetoj. Kvankam ordinare cirkuleroj donas tre malmultan frukton, — almenaŭ tuj videblan, — ili tamen servas por konigi nian lingvon, almenaŭ laŭ la nomo. Ne scias la semanto, ĉu la semoj ĝermos, sed li tion esperas.

*

— Ankaŭ la Arĥangelska filio de l' societo „Espero“ presigis malgrandan 4-paĝan folieton sub la titolo: „Pólnaja grammatika meĵdunarodnaho jazyka Esperanto.“ Ĝi enhavas la fundamentajn regulojn de la gramatiko kun la plej necesaj sciigoj por konatiĝi kun nia lingvo kaj literaturo. La folieto kostas 1 kopekon.

*

K. E. Blomberg †. Komercisto Karl Evert Blomberg post longa suferado tran-

kvile kaj pace mortis en Åbo (Finnlando) en la sabato, la 30-a de junio, en la aĝo de 52 jaroj, funebre kaj profunde sopirata de sia familio kaj aliaj liaj amikoj. Inter la amikoj de l' mortinto troviĝas multaj esperantistoj, kiuj en vojaĝoj tra Åbo ĝuis la eminentan gastamon, kiun malŝparis li kaj lia familio al ili.

Ripozu li en paco kaj liberaj generacioj flegu ĉiam la tombon!



El Petöfi.

KANTO.

Tra la stratoj de l' vilaĝo
Al cigana muzikaĵo
Dancas mi frenezigante,
Vinbotelon man-tenante.

Viajn kordojn nur ĝemigu,
Mian koron nur plorigu! . . .
Tie do, ĉe tiu domo
Estu gaja ĉiu sono!

Tie loĝas mia stelo,
Kiu de mi, de l' fidelo
Sin disigis, sin kaŝante,
Kaj alian nun amante.

Estas jen la fenestreto,
Nun eksonu gaj-danceto:
Ŝi ne vidu, ke kor' mia
Ploras pro ruzeco ŝia!

El la originala lingvo hungara tradukis

Adolf Altenburger.



LA DOKTORO ŜTELIGITA.

La doktoro Biron promenis iatage en la ĝardeno de Luksemburgo. Homo, tre bone vestita, al li sin turnas kun parolo kaj premas lian manon.

— Doktoro, ĉu vi min ne konas?

— Ne, sinjoro.

— Mi estas nomata Lefèvre, kaj mi estas komercisto en Lille, kie mi havis la honoron vin vidi antaŭ sep jaroj.

— Estas vere, ke mi tien faris vojaĝon antaŭ sep jaroj, sed mi ne rememorigas, ke mi tie vin vidis.

— Tio estas stranga. Ĉu vi volas preni? — (al li montrante sian flartabakujon.)

— Mi neniam prenas flartabakon.

— Ho! Al mi ŝajnis, ke vi tiam prenis.

— Mi ne plu prenas.

— Nu, ĉu vi do rememoras la tempon, kiam ni estis kune en la lernejo d' Harcourt?

— Mi tre bone memoras la tempon, kiam mi estis en la lernejo d' Harcourt, sed mi ne memoras, ke mi tie vin vidis.

— Tio estas stranga. Adiaŭ, sinjor' doktoro!

Post dek minutoj la nekonatulo revenas: nova ofero de flartabako, — nova rifuzo. La doktoro, kolera, al li turnas la dorson kaj foriras. Post ia momento li renkontas du siajn kolegojn kaj rakontas al ili sian aventuron, sin mem tre gloriante, ĉar li rifuzis la oferon de tabako de la mano de homo nekonata, de aventuristo, eble de ŝtelisto.

— Sed, — li daŭrigis paroli, — de mia mano, sinjoroj, oni povas preni. Mi havas flartabakon, kaj tian, kiu estas bona, kaj ĝi estas en flartabakujo, kiu kostas dudek frankojn kaj kiun mi ĵus aĉetis.

— Dudek frankojn! Ĝi devas esti tre bela, estante tiel multekosta.

— Vi vidis.

La doktoro palpis en sia poŝo. Ho! ho! neniu flartabakujo, sed bileto! Li sur tiu legis: „Doktoro, se oni ne prenas flartabakon, oni ne bezonas flartabakujon.“

Tradukis el franca lingvo

David Hermansson.



ESTIS IAM...

Mirrakonto de P. AHLBERG.

Estis iam.

Tra arbaro iris patro kaj lia malgranda filo, mano en mano.

El l' oriento levigis la suno de nova tago, disiganta la noktajn nebulojn.

— Vidu, patreto, tiujn ĉi multajn arbojn! Ĉu ili estas kverkoj?

— Ne, ili estas Esperantaj arboj...

Eksonis tra la arbaro toneto, klara, ŝveliganta ĝis potenceco.

La koboldoj malaperis en la mallumajn sekretajn kaŝejojn de la monto.

— Kia mirindaĵo, patreto! La Esperantaj arboj ja povas paroli. Aŭdu, kiel ili sonigas kaj murmuretas!...

— Ne, fileto mia. Tiuj ĉi arboj ne parolas pli ol aliaj arboj. Estas la vento de la tempo, kiu trablovas iliajn branĉarojn.



Admono.

El la ĉina*) verkisto **Huaj Nan.**

Gardu vin ĉiam daŭre tag' kaj nokto:
Ĉiam minacas vin perfidaj retoj:
Homoj ne falas pro altegaj montoj,
Homoj faletas nur pro talp-montetoj.

Tradukis

R. Geoghegan kaj A. Kofman.



Sur skribilo.**)

El la ĉina verkisto **Taj.**

Fasketo da haroj, vi estas portilo de ĉia
dangero!
Ĉe l' falo en retojn de akvo, la sav' estas
ebla afero,
Ĉe l' falo en retojn de l' stilo, foriĝas por
ĉiam l' espero.

Tradukis

R. Geoghegan kaj A. Kofman.



Sinjorino Ŭango.

Ĉina popola balado.

De l' fenestr' ekstere, de muslin' kovrita,
Tie frap' aŭdiĝas, kaj la jun-fraŭlin'

*) La ortografio „ĉina“ aŭ „cina“ estas pli justa ol „ĥina“: la nomo devenas de la dinastio Ĉin (prononcata de l' nuntempaj nordeinoj — Ĉin), reginta ĉirkaŭ 200 j. a. K., kiam Ĉinujo fariĝis konata al la eŭropanoj. La ĉinoj mem nomas sin Htang-jin kaj Ĥan-jin (Tang-anoj kaj Ĥan-anoj): Ĥtang kaj Ĥan estas nomoj de antaŭaj gloraj dinastioj de Ĉinujo.

R. G.

***) La ĉinoj skribas per hara peniko.

El interne diras: „kiu tie estas?“
„Sinjorino Ŭango: via najbarin'.“

La ĥoro: i hoa, i hoa, he!*)

Sinjorino Ŭango en la ĉambron venas
Kaj sur altan seĝon baldaŭ metas sin
Kaj sin turnas al ŝi: „Kia neaminda!
Kial vi malofte iras vidi min?“

La ĥoro: i hoa, i hoa, he!

Sinjorino Ŭango al la lit' aliras,
Ĝuas la parfumon de la tualet',
Ŝi la litkurtenon el damask' demetas —
„Kiel pala estas mia knabinet'!“

La ĥoro: i hoa, i hoa, he!

„Diru min, knabino, kiel vi fartadas?“ —
„Sinjorin', malbone, tre malbone, ve!
Mi ne havas forton kaj al mi plen-mankas
Apetit' je mia rizo kaj je l' te'.“

La ĥoro: i hoa, i hoa, he!

„Ĉu mi al vi voku ian kuraciston?“ —
„Ne, ho ne, ne voku, mi petegas vin,
Li abomenaĵon min devigos trinki
Aŭ radikon mangi, mi ne amas ĝin!“

La ĥoro: i hoa, i hoa, he!

„Ĉu mi ne invitu pastron la Budhistan?“
„Ne! Mi timas tinton, kaj la sank-Budhist'
Tuj al mi komencos laŭte tamburadi
Kaj sen fin' tintegi laŭte kun persist'.“

La ĥoro: i hoa, i hoa, he!

*) Tiuj ĉi sonoj ne havas difinan sencon.

R. G.

„Ĉu mi voku al vi pastron Lamahiston?“
 „Sinjorin', mi petas, ha, ne voku, ne!
 Li nur zumos, preĝos kaj kantados psalmojn,
 Kaj mi tre malamas tion ĉi, ho ve!“

La ĥoro: i hoa, i hou, he!

„Sed vi malsaniĝis, kial?“ — „En la tago
 De la flornaskiĝo, kiam la burĝon'
 De l' persik' montriĝas, mi dum la promeno
 Vidis jun-studenton . . . kia bel-person'!“

La ĥoro: i hoa, i hoa, he! ♡

„La promen' ? . . . sed kial tio ĉi vin tuŝas?“
 „Li min amas, ĉar mi estas bel-fraŭlin',
 Mi lin amas, ĉar li estas juna homo
 Kaj student': li amas, li konfesis ĝin.“

La ĥoro: i hoa, i hoa, he!

„Li vin amas? Tamen se sciĝos tion
 La gepatroj de vi?“ . . . „Ho, la patro, li
 Havas sepdek jarojn, kaj la patrineto
 Estas surda, blinda, preskaŭ sen konsci'!“

La ĥoro: i hoa, i hoa, he!

„Tiam edziniĝu!“ — „Baptanin', mi petas,
 Gvidu la aferon, fianĉigu nin,
 Sen fianĉ' mi estas, li — sen fianĉino,
 Ha, se vi rifuzos*), mi mortigos min!“

La ĥoro: i hoa, i hoa, he!

Tradukis

R. Geoghegan kaj A. Kofman.



*) Laŭ la ĉinaj moroj ĉia edziĝo estas aranĝata de svatistino.

LA UNUA GURDO.

Kristnaska rememoro

de

GUSTAF SCHRÖDER.

(Fino.)

Pli proksime ol je la duona distanco al la buŝo ne atingis tamen la kruĉo, ĉar subite eksonis ia neordinara muziko. La sonon surdigis duoblaj fenestroj, kurtenoj kaj bone fermitaj pordoj, sed ĝi sonis plentona kaj bonsonora. Kio do estas? „Jes, kio estas?“ La sorĉuloj. Neniu povis respondi. Kiu aŭ kiuj povis tiel muziki? Ĉu la sorĉuloj? Miro spegulis sin en niaj vizaĝoj, ni rapidegis eksteren. La pordo estis svinge malfermata plenege, kaj jen en la lumbrilo staris neĝkovrita figuro kaj ĉirkaŭtiradis manoturnilon.

„Ha! gurdo!“

La ensorĉo estis solvita, solvita en komunan ĝojon. Finis la muzikaĵo. „Envenu!“ Ne, la viro komencis novan muzikaĵon, kaj pacienco ni aŭskultis ĝin ĝis fino, kvankam komencis esti malvarme kaj la neĝo disbloviĝis ĉirkaŭe. „Volu enveni!“ estis ankoraŭ ripetita, sed sen efiko; ĉar la viro preparis sin por daŭrigi.

„Ah,“ diris nia gasto, „li ne komprenas svede.“ La invito estis ripetata germanlingve, kion ĉiuj gurdmuzikantoj, kiujn ni vidis, ŝajnis kompreni. Tiun ĉi fojon li nin komprenis, eklevis sian instrumenton kaj envenis en la vestiblon, kie nia servantino, malgranda dalbyana knabino, tuj estis preta forigi per balailo la neĝon de sur la muzikanto, dum ke ŝi ŝteliĝeta rigardis jen lin jen lian instrumenton.

Kiam la viro estis balaita, ni petis lin enveni kaj gustumi la kristnaskan bieron. Dankema rigardo el liaj bruna-

nigraj okuloj kaj longaj glutadoj el la kruĉo parolis al ni, ke nia kristnaska trinkaĵo estis bonveninta.

Nun li volis ree muzikadi por ni, sed ni petis lin, ke li sidiĝu kaj restu ripozante ĉe ni dum la festotagoj. Ni mem estis ja malproksime de la hejmo, malproksime de parencoj kaj amikoj. Ni opiniis, ke la longvojaĝa migranto bezonis ripozon kaj afablon tie ĉi for supre en la nordo ĉe glacio kaj neĝo. Li ne sciis, ĉu li kuraĝas akcepti nian gastamon, sed tiam ni sciigis lin pri nia malnova nordana moro, kaj ke la kristnasko estas festo fraktiga tie ĉi, kiel en la sudo.

„Bone, se tiel estus,“ li diris malgaje, „sed tian gastamon, kiel tie ĉi en la nordo, oni ne trovas ĉe ni. Kia feliĉa popolo estas vi svedoj! Tie ĉi oni povas iri, kie ajn oni volas, sendanĝera pri sia vivo kaj posedaĵo. Kiom vi estas feliĉaj!“

Ke oni, kiel li diris, ne povas veturi sendanĝera pri sia vivo kaj haveco en lia hejma lando, tion ni kvankam sciis laŭ la rabistaj romanoj, kiujn ni legis, sed kiujn neniu kredis. Eble iom da vero troviĝis en ili. Sed nun ne estis tempo por pensi pri seriozaj aferoj. „Nun ni eklumigu la abion,“ kaj tio estis farita en fluga rapido.

La pordo de la kuirejo estis malfermegata, kaj envenis ĉiuj domanoj. Ili ne estis multaj: Sara, la vidvino kaj ŝia kvarjara knabo, „Negblovo“ (la servantineto), kaj nia nigrahara, serioza servanto Halvar, vera dalbyviro. Por la du lastaj la kristnaska abio estis apero ĝis tiam ankoraŭ ne vidita. Ankaŭ estis legata en iliaj vizaĝoj alternanta mirado, admiro kaj ĝojo.

Je la sudano, katoliko, la abio faris videblan solenan impreson. Li ŝajnis ekscitata, kaj laŭ la movoj de liaj lipoj oni vidis, ke li parolis kun si mem vortojn,

kiujn ni ne sciis deĉifri, sed kies sencon ni tamen divenis. Fariĝis dum iaj momentoj sentiĝo de kristnasko en nia malgranda akompanaro.

Tiam ni ekaŭdis paŝojn kaj surda bruado en la korto. Ingejerd („Negblovo“) elrigardis kaj diris: „Jen, kiom da homoj!“

„Demandu, kion ili deziras!“

„Ha,“ ŝi diris montrante siajn sanajn brileblankajn dentojn, „ili aŭdis la muzikon kaj alvenis por sciigi, kio estas.“

Ha, tion ĉi ni tuj komprenis, konante la seivolecon de niaj najbaroj, la arbaranoj. La kurtenoj estis detiritaj, kaj ni petis nian italon, ke li aŭdigu la mirindaĵon, la unuan gurdon, kiu tonis en nia malproksima valo.

Li agordigis ĝin antaŭe. Ĝi estis eĉ por ni nekonata instrumento kaj sonadis pli pure kaj bele ol ia klavero aŭ kiel malnova fortepiano, multe pli bone ol la gurdoj ordinaraj.

Fariĝis tuj plena silento en la korto, kaj tie staris mirigita kaj pie aŭskultanta grupo da homoj de ĉiaj aĝoj. La muzikaĵo prezentata estis ia serioza kaj melanĥolia melodio tirola, ia „Ständchen“; kiu — mi ne rememoras. Post ĝia fino pli ol unu vizaĝo premis sin plata kontraŭ la fenestraj vitroj, por ankaŭ povi vidi, kiu aperigis tian mirindan muzikon.

Oni interŝanĝis siajn lokojn, tiel ke aliaj povis envidi je la kristnaska abio kaj la instrumento. Kaj oni komencis mallaŭte interparoli. Tute subite eksonis vigliga polko. Tiam oni vidis brilantajn okulojn kaj blankajn dentarojn. La bruo pligrandiĝis, kaj Ingejerd enŝovigis la kapon, demandante, ĉu la muzikanto volas elveni, nur por malgrandeta momento. Eksteren en la neĝon li ne povis alveni,

sed en la vestiblo li povis muziki unu ludon aŭ du, kaj tiel fariĝis. Per ĉiuj lumiloj, kiujn ni posedis, ni lumigis, kaj la grandaj pordoj estis tute malfermitaj, por ke ĉiuj povu rigardi.

Jam ni petis la najbarojn, ke ili reiru hejmen. Dum la tagoj de la kristnaska festo li muzikados en ĉiuj kortoj, kie oni deziras. Ĉe tiu ĉi promeso ĝojkriis la jam tre multnombra anaro, kaj ni aŭdis kelkajn krietajn al ni, ke ni neniel lasu lin foriri, antaŭ ol ili aŭdis lin plu. Neniam antaŭe ili kredus, ke tia „parada“ muzikilo ekzistas en la mondo.

Ne estis malfacile por ni kompreni la entuziasmon de niaj najbaroj. Kio okazas, kio ekzistas ekster la vilaĝo kaj la paroĥo, pri tio ili havis nenian prijuĝeton, ĉar ankoraŭ en 1850 nenia vilaĝano havis gazeton, kaj eĉ se ia tiela, pruntita ĉe ia sinjoro, troviĝis, la sciantaj legi ĝin estis treege malmultaj.

Kiam ni ree eniris, nia kristnaska abio estis malluma, la pecoj da kandeloj estis jam elbrulintaj, sed anstataŭ tio ĉi brulis en la senferma kameno fajro kraketanta, kiu lumis pli hele ol la pecoj de la vaskolono.

Ni sidigis, kaj nun ni rememoris pri la kristnaskaj donacoj, kiuj jam ne havis tute la saman ĉarmon kiel antaŭe. Ili estis disdonataj, kaj tiam montriĝis, ke ili estis ĉies propraj posedaĵoj, nome gantoj, ŝtrumpoj, botoj k. t. p., sed la versoj kaj devizoj estis eksterordinaraj kaj kaŭzis multajn kaj bonajn ridegojn.

Kiam tiu ĉi afero estis farita, nia italo ricevis demandojn, unue pri tio, kiamaniere li alvenis kaj de kie. Li rakontis, ke li venas trans la Dekmejla arbaro el Dalekarlujo. Li estis en irado dum multaj tagoj, vagadis erarante kaj ne sci-

ante, kie li sin trovas. En la lastaj tagoj li frostis kaj malsatis, ĉar lia malmulta provizo da nutraĵo estis konsumita. Unu vesperon post la veno de la mallumo li ripozis, senfortigita pro laceco, sub kelkaj branĉoriĉaj abioj, kaj baldaŭ li aŭdis pezajn paŝojn, krakadon de branĉoj kaj ĝemojn.

„Tiam mi sciis, ke urso estis proksime, mi kredis, ke baldaŭ ĝi min manĝos, kaj tiom lacega mi estis, ke mi pensis, ke estas por mi tute egale. Sed ankoraŭ unufoje mi volis aŭdi mian karan instrumenton, kaj tial mi ektonis melodiojn el mia patrujo. Tiam la urso foriris: mi estis savita. Dio kaj la sanktuloj vidis mian danĝeron kaj min savis; nun mi estas denove ĉe bonaj homoj.“

Ni estis tro junaj kaj senspertecaj por kompreni la sentojn de la fremdulo, la teruron, kiu sendube lin kaptis, kiam, erariranta kaj malsatega, li trovis sin malproksime de sia bela hejmlando en arbarego de l'nordo. Ni ridis kaj diris, ke pri urso ne estas danĝero en tiu ĉi jartempo: ĝi kuŝas trankvile dormanta en sia vintra nesto. Se ion li aŭdis, tio estis alkoj pasantaj apude, kaj ili ne estas danĝeraj.

„La sinjoroj iru nun en la supran ĉambron,“ diris Sara; „mi volas tuj aranĝi la manĝotablon. La muzikanto eble ne manĝis en multaj tagoj.“

Ŝiaj vortoj trafis nin kiel bombo. Ni tre malĝojis, ke ni tiel forgesis. Ĉe nia demando la viro respondis, ke jam frue en la mateno li trovis dometon for sur la monto, tie li manĝis kaj ripozis dum la tuta tago. Nun li estis en bona stato.

En la sekvanta mateno nia itala gasto estis vekita en la fruo kaj estis demandata, ĉu li volas kune veturi al la preĝejo kaj la kristnaska frumeso. Volonte li volis,

se tio ĉi estis al li permesata. Jes, estis permesata al ĉiuj veni en la domon de Dio.

La mejlologna vojo ĝis la preĝejo, la multaj glitveturiloj, la hele lumantaj torĉoj, la altkreskaj, bonvestitaj dalbyanoj ŝajnis tiri al si lian atenton, kiel ankaŭ la lumigita preĝejo, la prediko kaj la kanto, ĉar ia orgeno ankoraŭ ne ekzistis ĉe tiu tempo en la preĝejo de Dalby. La tutan daŭron li sidis tre atenta, sed elvidis iom maltrankvila kaj miranta, kiam, post ke la pastro diris „amen“, mi tuj kaptis lian brakon tirante lin el la preĝejo for al niaj glitveturiloj, en kiujn ni senhalte ensidiĝis kaj ekveturis hejmen, kiel plej rapide la ĉevaloj kapablis kuri.

„Ĉu ia danĝero minacas?“ li demandis.

„Ne, tute neniell! Tie ĉi en Dalby, kaj en multaj aliaj lokoj de nia lando, ekzistas legendo, ke tiu, kiu revenas la unua hejmen al sia vilaĝo, de la kristnaska meso, li ankaŭ la unua rikoltos sian grenon en la venonta aŭtuno.“

Tiam la muzikanto elvidis ĝoja, balancis la kapon, precize kvazaŭ ekzistus ia simila legendo en lia hejmo.

Ni ankoraŭ ne finis nian tagmanĝon, kiam nia najbaro, la tiel nomata „Korpo“, unu inter la pli maljunaj vilaĝanoj, enpaŝis ĉe ni petante, ke la fremda muzikanto venu ĉe lin. Tiu ĉi konsentis, kaj ĉe la Korpo oni dancadis la tutan nokton ĝis la mateno, tiam oni venigis la italon al la plej proksima vilaĝo. Kaj tiamaniere lia marŝo iradis de domo al domo, de vilaĝo al vilaĝo la tutan vintron. Niaj honestaj, naivaj arbaranoj ekaŭdis kaj ekvidis ion mirindan, kio impresis al iliaj sentoj.

Iam post iam mi renkontis nian muzikanton, kiu sciis jam komunikiĝi iom

svedalingve. Li estis brilante ĝoja, faris grandan sukceson kaj perlaboris multe da mono. Ankoraŭ unu similan vintron, — kaj poste, li esperis, li povos returni al sia hejmo kaj restadi tie trankvile.

Efektive li revenis en la sekvinta aŭtuno. Oni ne laciĝis je la muzikado de l'italo. Li estis bonveninta ree, kaj oni dancadis en ĉiu vilaĝo laŭlonge la tuta valo ankaŭ tiun vintron.

Ĝojon kaj gajadon portadis kun si en nia malproksima valo la *unua gurdo*.

El la kalendaro „Svea“ 1895 tradukis

Paul Nylén.



La amo de l' rozo.

(Fantazio.)

Ĉiutage unua radio de l'suno vekigadis ĝin, kaj vespere, kune kun lasta ĝia rigardo, la rozo dormigadis.

La najtingalo dormigadis ĝin per kantoj, la luno vindadis ĝin per radioj siaj, la roso matene freŝigadis ĝin per malsekaĵo sia . . .

Ĝi estis rozo, la reĝino de l'floroj . . .

Ĝi estis bela, kiel songo, — freŝa, kiel mateno printempa, — pura, kiel animo de l'infano, — delikata, kiel amo unua.

Sur la supro de ĝia alta trunketo floriĝis la floro ruĝa, ĝi altiradis al si la rigardojn, kiel la vizaĝeto de bela fraŭlino, kiam ŝiaj palaj vangetoj ruĝiĝas de konfuzo kaj feliĉo, kiam ŝi parolas je la unua fojo al sia amato — „mi amas vin“ . . .

Ĝi estas la reĝino de floroj, kaj ĝia sceptro estas donita en ĝian manon kaŭze

de ĝia beleco kaj bonodorado. Ĝia floro starigis ĝin vice kun la plej belaj kaj bonodorantaj kreskaĵoj.

Ĝin karesis la suno per siaj varmaj radioj, la pluvo freŝigadis ĝiajn folietojn, la venteto sekigadis ilin, kaj abeloj alflugadis al ĝi por rakonti la novaĵojn de l' ĝardeno . . .

La narciso, levkojo, heliotropo — ĉiuj rigardis ĝin kun plezurego, enviadis je ĝia beleco kaj bonodorado, serĉadis ĝian amon . . .

Sed la reĝino de floroj estis fiero . . .

La hedero rigardis kun envio la florojn aliajn, — ankaŭ ĝi amis la rozon, sed ne esperis, — ĉar la plej belaj floroj ne havis sukceson, kaj ĝi?

Kio estas ĝi, la hedero?

Subite aperigis en la ĝardeno novaĵo: la koro de la reĝino ekstremis. Ŝi ekamis . . .

Kiu, kiu estis la feliĉulo elektita?

La folietoj de la rozo ruĝiĝis, ĝi klinis sian kapon al la hedero, kaj ĝi komprenis, ke ĝin ekamis la reĝino de floroj.

Ĝi rapide kliniĝis al la rozo, ĉirkaŭprenis ĝian talion per sia verdaĵo, kaj en la momento, kiam la hedero aliĝis al la rozo, sur ĝia plej alta trunketo floriĝis helepunca floro . . .

Se virino aŭ fraŭlino ekamos iun aŭ ŝin iu ekamos, oni ofte demandas: por kio? kiel aperigis tiu ĉi amo?

La respondo estas malfacila . . . nebla . . .

Por io la amo ne venas . . .

Ne amo kristana, frata, sed la amo universala; la amo estas potenculo, la ordonanto de animo, la reĝino de volo, la amo estas la komenco kaj la fino.

Ĝin — tiun ĉi amon — nenio naskas kaj nenio povas mortigi.

Libera, kiel ondo de maro, kiel vento de dezerto, — ĝi mem naskiĝas, potencas, kiel despoto, sen limoj . . . kaj mortas ensorbigitaj de si mem.

Ĝi estas pli forta ol fortoj de l' naturo, ĝi limojn ne havas! . . .

Ĝi regas, ĉar ĝi aperigis, kaj tiu ĉi regado daŭros, dum daŭros la vivo ĝia.

Ĝi ne scias, ĉu ĝi regas por la feliĉo aŭ por la malfeliĉo.

La reĝino havas sur sia kapo la kronon-pasion, kaj — dum ĝi regos sur la tero, — ne estas kaj neniam estos inter homoj paco, frateco, libero . . .

Kaj neniu sciis, eĉ mem la rozo, kial ĝi ekamis la hederon . . .

La hedero ĉirkaŭprenis ĝin per siaj branĉoj, kovris ĝin de rigardoj ĵaluzemaj.

La hedero volis nur sola ĝin ami . . .

Ĝi estis ĵaluza kaj al ekbloveto de l' vento, kiu movadis la foliojn de l' rozo, kaj al la suno, kiu karesis la rozon per siaj varmaj radioj, kaj al la malgaja rideto de la luno . . .

Ĉiam pli dense la hedero kovradis la rozon per siaj larĝaj folioj. Ĝi ĉirkaŭis la tutan rozon por ŝirmi de la vetero malbona kaj de la lumo; ĝi sola ĝin vidis, sola ĝin posedis . . .

Sen lumo kaj sen malsekaĵo forfaliĝis la folietoj de l' rozo, faliĝis la folietoj, malsaniĝis la trunketo, kaj la rozo mortis sub la densa kaj delikata ombro de l' hedero.

Ree venis la printempo; la hedero ĉirkaŭprenis per siaj branĉoj la fortan trunkon de kverko.

Kaj la malfeliĉa rozo sekigis, la ĝardenisto forigis ĝin, kaj sur tiu loko, kie ĝi kreskis, nigriĝis nur sola ŝtipeto malgranda . . .

El lingvo rusa tradukis

I. Malfeliĉulo.

„Kiel ni pardonas“.

— Nu, fileto, ni rapidu! via patreto eniros baldaŭ por tagmanĝi, kaj mi estos ne fininta mian laboron; rapidu.

— Jes, patrineto; — kaj la infano daŭrigis sian preĝon: — ... panon nian ĉiutagan ...

— Pardonu al ni ŝuldojn niajn ...

— Pardonu al ni ŝuldojn niajn ...

— kiel ni pardonas ...

— kiel ni pardonas ... Diru, panjo, tiam la Bona Dio neniam pardonos al ni?

— Kial tio, korega mia?

— Tial ke, hieraŭ, kiam mi estis en mia liteto, vi disputadis kun patreto; kaj mi aŭdis vin dirantan al li: „ha! mi neniam pardonos al via patrino! Ke ŝi sole venu tien ĉi, kaj mi formetos ŝin ekster la pordon.“ Patreto ploris, kaj vi venis rapide por vidi ĉu mi dormis. Tiam, mi fermis la okulojn por ke mi ne ĉagrenu vin, patrineto ...

Ŝi tre ruĝiĝis. Fortega sentebleco skuis ŝin. Tio estis tamen vera, kion diris tiu ĉi infano kvinjara, fariĝanta ŝia kulpiganto! ... De tiu ĉi tempo, ĉiumatene kaj ĉiuvespere, farante sian preĝon, ŝi mensogos do al la Bona Dio! ... kaj ŝi kondamnos sin mem! ... Sed, kio! ... pardonu al sia bopatrino! ... post la frazoj malpacaj, la aludoj perfidaj, kiujn ili reciproke estis al si adresintaj, hieraŭ vespere ... Ne eble! neniam! ... Tamen? ... tamen ... nenion ... Se oni pardonus ĉiam, ne estus plu rimedo por havi la pacon ...

— Nu, panjo, vi do ne finigas al mi mian preĝon?

Tre maldolĉe, eĉ kun tono kruda, kiu surprizis sin mem, ŝi respondis:

— Lasu min trankvila! Mi ne havas nun la tempon.

La infano, mirigata, rigardis ŝin longe; poste, kaŝinte sian kapon sub la litkovriloj, li ekploradis silente.

* * *

— Ni iru! jen ankoraŭ unu tago kiu komencas bone, — al si diris la juna virino. Kaj, por doni novan direkton al siaj pensoj, ŝi okupis sin ageme pri la domaj zorgoj.

Sed vane; ĉar ju pli ŝi rapidiĝis je la laboro, des pli rapide ankoraŭ revenis ŝiaj tumultantaj pripensoj. Tiu ĉi frazo de l' infano: „Tiam la Bona Dio neniam pardonos al ni“, ĉiame revenis al ŝia memoro. Lacata de tiu ĉi penso, por doni al si iom da ripozo, ŝi konkludis: „Bone, bone; mi petados mian edzon ke li aliru vidi la bopatrino, kaj ke li diru al ŝi ke mi estis hieraŭ transirinta iom la mezuron, en miaj paroloj ... Sed ankaŭ! ... kial? ...“

Kaj la balao balais ... la broso frostis ... la plumaĵo sarkadis en ĉiuj anguloj ... Sed ĉiam ŝi pensadis je tiuj ĉi paroloj: „Pardonu al ni ... kiel ni pardonas ...“

Tiam ŝi sidiĝis sur seĝo; ŝi metis sian kapon en siaj ambaŭ manoj, kaj pripensadis ... Post ĉio ... eble la ĉikano ne estis tiel grava kiel mi pensas ... Simpla interparolado iom tro viva tuŝante elspezeton mastruman ... unu sensencaĵo! ... Kaj, poste, de vorto je vorto; de frazo je frazo, la interparolado fariĝis disputado, en kiu oni elparoladis kelkajn insultojn. Sed, per unu vorto, preskaŭ nenio ... Jes! ... sed tiu ĉi preskaŭ nenio sufiĉis por ke du koroj, kiuj sin amadis reciproke ĝis tiam, estu, de tiu ĉi momento,

fermataj unu al la alia; por ke la dolĉa afableco, kiu unuigis ilin, sin ŝanĝu en malamo.

„Pardonu al ni ŝuldojn niajn, kiel ni pardonas“ . . . Se oni povus detrui la pasiton . . . forgesi tiun ĉi malafablan disputadon; kaj vivi, — se ne tiel bone kiel antaŭe, — almenaŭ kun decaj rilatoj! . . . Eble sensignifa klopodo sufiĉus por tio . . . Oni ekkaptus la momenton kiam la bopatrino estus ĉe l' pordo de sia domo; oni trairus kvazaŭ okaze, precize je tiu momento . . . Kaj, sen petadi rekte pardonon, oni dirus simple ke oni bedaŭras esti lasinta sin koleriĝi . . .

Sed, mallaŭte, en la fundo de sia konscienco, la juna virino aŭdis voĉon dirantan: „Ĉu tio estas pardoni kiel ni deziras ke Dio pardonu al ni? . . . Ĉu sufiĉus ke la Bona Dio pardonus tiel al ni? . . . Pardonu ne estas sole forgesi, estas ami tiel same kiel antaŭe . . . Ja, kiom da fojoj! kaj, kiel pli grave, ni ofendis Dion tiel bonan, tiel pardoneman, tiel malavaran, tiel pacienceman! . . . Kaj tamen sufiĉis ke la malŝparema infano revenu sin ĵeti en liajn brakojn, kriante: „pardonu, Patro“, por ke tiu ĉi tuj pardonu kaj donu al ĝi sian antaŭan amon.

Kaj la voĉo daŭrigis: „Ne morgaŭ, nek hodiaŭ vespere, eĉ ne en tiu ĉi posttagmezo estas necese pardoni, sed tuj! Ĉu la evangelio ne diras: „Kiam do vi prezentos vian donon al la altaro, se tiam vi memorus ke via frato havas ion kontraŭ vi, lasu tie vian donon antaŭ la altaro, kaj aliru antaŭe paciĝi kun via frato, kaj poste, vi revenos oferi vian donon“ ?

Unu longa momenteto pasiĝis, dum kiu ŝia propramo batalis kontraŭ la voĉo de ŝia bona anĝelo.

Poste, ŝi leviĝis subite; kaj, sen preni eĉ sian ĉapelon, ŝi malfermis la pordon, kaj eliris . . .

* * *

Avino estis en sia kuirejo. Ĝuste tiun ĉi tagon, la fajro ne volis ekflami. Jam de pli ol unu horo ŝi batalis kontraŭ la fumo; ŝanĝis la ligneton; dolĉe blovis per la buŝo por eksciti la flamon, sen flugigi la cindron; sed nenio estis taŭga.

Oni frapas ĉe l' pordo.

— Eniru! — kriis ŝi, sen sin movi.

Ŝia bofilino malfermis la pordon.

Ŝi havis la okulojn plenaj da larmoj, kaj ŝi diris: „Patrino, pardonu al mi! Ni amegu nin unu la alian kiel antaŭe!“

Avino, dum momenteto, eksentis ian ribelan senton en sia koro . . . ŝiaj okuloj ekbrilis malamike.

Kaj, ĉar la juna virino restadis ĉiam sur la sojlo de l' pordo, sen kuraĝi eniri, sed ripetante dolĉege: „Pardonu, patrino“, la kolero de tiu ĉi subite malaperis; ŝi malfermis siajn brakojn kaj diris simple:

— Mia infano!

* * *

Tagmezo sonoras. La patro elvenas el la butikon.

— Nu, edzineto, por kiu do tiu ĉi tablotuko? — diris li tre surprizata. — Ĉu vi invitis iun hodiaŭ?

— Jes, — respondas lia edzino, — ni estos kvar hodiaŭ.

— Ha! Kiu do?

Je tiu ĉi momento la avino malfermas la pordon, eniras, kaj ŝi ridetas.

La patro, tre malkvieta, ĵetas petegantan rigardon al sia edzino; sed tiu ĉi, kun ĝoja tono:

— Eniru, patrino, eniru, oni atendas vin.

Kaj, dum la avino forigas sian ŝalon kaj metas ĝin zorge sur la liton, la juna virino prenas la fileton sur siaj genuoj, fermas al li liajn okulojn, unuigas liajn ambaŭ manojn, kisas lin sur la fronto kaj diras:

— Nun, mia karega, ni daŭrigu kaj finu nian preĝon.

Eĉ antaŭ ol lia patrino havus la tempon diri ĝin al li, la infano, ĝoja, daŭrigas:

— . . . pardonu al ni ŝuldojn niajn, kiel ni pardonas al niaj ŝuldantoj . . .

Finite la preĝo, la patro eliras el la ĉambro.

— Kien vi iras? — demandas al li lia edzino.

— La kavon, por elpreni botelon da maljuna vino . . .

(Eltiro el „La Famille chrétienne“.)

Tradukis

F. X. I. Solis.

Adresaro de niaj abonantoj.

(Daŭrigo.)

Aŭstrujo:

302. „Gazeta Handlowo-Geograficzna“, en Lemberg (Galicio).
323. J. Holub, instruisto, en Wernsdorf tra Frankstadt a/R (Moravujo).

Belgujo:

297. „La Petit Bleu“, 29 A, Montaigne-Aux-Herbes-Potagères, 29 A, en Bruxelles.
304. „La Sténographe Populaire“ s-ro L. Dudicourt, 16, rue de Berlin, en Ixelles-Bruxelles.
306. „Journal des Duployens Belges“, rue Boudewyns, 75, en Anvers.

308. Bulletin Mensuel de l'Union Syndicale des Sténo-Dactylographes de Belgique, — Boîte postale, N° 727, en Anvers-Centre.

Bulgarujo:

288. Stefan Ĥr. Krokodiloff, lernanto en la seminario, en Samokov.

Danujo:

309. Det Kongelige Danske Videnskabernes Selskab, en Köbenhavn.

Francujo:

298. „L'Espérantiste“, en Épernay (Marne).
299. „Concordia“, 77, rue Denfert-Rochereau, en Paris.
300. „La Plume Sténographique“ s-ro F. Canet, rue Manigne, en Limoges.
301. „L'Humanité Intégrale“, 6, rue de Douai, en Paris.
303. „Journal de Ciel“, Cour de Rohan, boulevard St.-Germain, 130, en Paris.
305. „Revue de l'Enseignement Sténographique“ s-ro David, en Arras.
310. Jean Fréhis, peintre, 6, rue d'Ecosse, en Paris.
319. Léonce Boutiwn, 85, boulevard Brune, en Paris.

Hungarujo:

326. Julio Molnár, en Hódságh, Bács m.
327. Ludoviko Mihálovich, en Szegzárd.

Nova-Kaledonio:

329. E. Bardoulet, Administration Pénitentiaire, en Nouméa.

Rusujo:

285. V. Gedroic, en St. Skudi, Kovenskoj gubernio.

286. Mozes Goldberg, en Narovl, gubern. Minsk.
287. Aleksandro Ĉuvajlo, teĥnik, en St. Liĥaja, Jugo-Vost. ĵel. dorog.
289. Aleksandro Robertoviĉ Nippa, en st. Ivanino, Kurskoj gub.
- 290—291. A. A. Zinoviev, en Poltava, Sadovaja 6. (2 ekz.)
292. N. M. Solovjev, en Vladivostok, Kontrol.
293. Fraŭlino S. A. Sviridov, en S. Peterburgo, B. Moskovskaja 1—3.
295. A. M. Ĥrabrov, kadetski korpus, en Nijni-Novgorod.
296. P. Kadik, muĵskaja gimnazija, — en Krasnojarsk.
311. Polkovnik ĉekmarev, en Varsovio, strato Kruĉaja N^o 7.
312. J. Ĵivotovski, kursoj de stenografio, en Odessa.
313. V. Tatarinov, en Stavropol, Kavkazski, Andrejevskaja 27.
314. K. Boguŝeviĉ, en Stavropol, Kavkazski, Andrejevskaja 14.
315. Jakobo Prede, en ĉusovaja, gubern. de Perm (estro de la poŝt-telegrafa kontoro).
316. Dr. ŝ. J. Mer, en Posvol, Kovenskoj g.
317. M. Popov, instruisto (uĉitelju), en Koubachevo, (Viatskoj gub.), Yarskango Ouezda.
318. S-rino Antonina Stankieviĉ, en Odessa, Kniajeskaja d. n-ro 8, kv. 15.
324. S. F. Polĵanskij, en Ĥabarovsk, — Sibirio Orienta.
325. K. Petrĵajevskij, (al leŭtenanto de Ĥvalina, rezerva bataljono), en Saratov.
328. Serg. Miĥajlov, en Kazan, Novopješĉanaja ulica, dom svoj.
330. Filio de l' societo „Espero“ (Duĥovnaja Pravoslavnaĵa konsistorija), V. Ignatov en Arĥangelsk.

Svedujo :

294. E. Hellgren, Sjtullsborg, en Karlstad.
320. Karl Holm, Larsgatan 6, en Upsala.
321. Ivan Brusell, Bistaborg, en Bälsta.
322. Alfred Sandborg, Jernbrogatan 26, en Upsala.

Unuigitaj Ŝtatoj Amerikaj :

307. „O Arauto“, 1006, Webster st., en Oakland, Cal.

ŜANĜITAJ ADRESOJ :

55. Karl Boman, rue Cadet, Signes Electriques, en Paris.
210. V. Rogaĉev-Antonov, en S. Peterburgo, Mješĉanskaja 19, loĝ. 23.
271. Aleksandro Zakrĵevski, agente de la lingvo Esperanto, en Vologda, strato Roŝĉenskaja uĝol Galkinskoj, domo de Kirŝina.

I n f o r m e j o

de esperantistoj.

Vi, esperantisto, kiu ajn vi estas, volu atenti tion ĉi, ĉar ĝi koncernas precize vin !

Charles Méray, profesoro en la Universitato en *Dijon* (Francujo), korespondanto de la Franca Akademiaro, laboradas por altiri al Esperanto la sciencajn homojn de sia lando kaj volas konvinki ilin per materialaj pruvoj; por tio, s-ro Méray petas insiste ĉiun amikon de Esperanto, en la landoj kie la franca lingvo ne estas parolata, ke ili volu, kiel eble plej rapide, sendi al li leteron aŭ poŝtkarton skribitan Esperante (prefere enhavantan kelkajn sciigaĵojn pri la praktika uzado kaj nuna koniteco de Esperanto en sia lando aŭ aliloke laŭ sia kono). Tiuj ĉi korespondajĵoj neniam estos tro multaj.

*

— **Korespondado.** S-ro Hugo Karlsten, folk-skolelärare (popola instruisto), — adr.: Hälberg, Glommersträsk (Svedujo), — deziras korespondi kun fremdlandaj esperantistoj precipe ia instruisto aŭ instruistino.

— **Franca esperantisto** deziras korespondadi Esperante por interŝanĝo de poŝtmarkoj. Henri Dorange, 27, Ronsdorferstrasse, Unter-Barmen, (Germanujo).

— **D-ro Diodono en Sofia** (Bulgarujo) deziras korespondadi en Esperanto.

✱

POŝTA KESTO.

Demando. Oni legas en la marta numero de „Lingvo Internacia“, ke inter aliaj parolis pri nia lingvo „Arpa Grafica“, „Corriere Ligure“, „Journal de Bordighera“, „La Martinella“, „Cronaca Ligure“, „The Swiss and Nice Times“, „Per l'Arte“ kaj „Gazzetta di Parma“. Bedaŭrinde oni nin ne sciigas en kiuj numeroj de l' supre nomitaj gazetoj ni povas trovi la diritajn artikolojn.

Ĉu ne estas eble ekkoni tion ĉi el unu el sekvantaj numeroj de l' „L. I.“?

Tiu sciigaĵo estos kredeble utila por multaj esperantistoj.

Mi ekzemple havas sekvantan kutimon. Trovinte ian gazeton kun favora artikolo pri Esperanto mi sendas tian numeron aŭ al gazeto, aŭ al persono, kiujn mi volas altiri al nia afero kaj kies ideoj plej eble estas la samaj, kiel la ideoj de l' sendata gazeto.

Tiajn gazetojn mi aĉetas per ia librejo, sed la numeroj devas absolute esti konataj por tio.

Avero.

Respondo de la redakcio. Se estas al ni eble, ni ĉiam nomas la numeron kaj la ĉefan enhavon de la gazetoj, kiuj parolas pri Esperanto. Tial ni senĉese petas ĉiun esperantiston, ke li volu sendi al la redaktoro en Upsalo ĉiun tian ekzempleron, eĉ se ĝi enhavas nur malgrandetan noton pri nia afero, — se la sendanto konsideras tion bezona, li ankaŭ sendu bonvole la Esperantan tradukon*) de la artikolo. Multaj personoj tiel agas; ilin ni dankas. Sed granda nombro da artikoloj tute preteriras al ni senkonate.

La aludita raporto pri italaj gazetoj, parolintaj pri nia afero, estas ĉerpita el la gazeto „L'Espérantiste“, kiu mem ne nomas la numerojn.

Rebusoj.

De Paul de Lengyel.

I.

an'au

II.

D L Ra K R

*) La latinidajn kaj germangentajn lingvojn oni ne bezonas traduki al ni.

La solvojn de tiuj ĉi rebusoj ni presos en la septembra numero. Ni petas tiujn inter la legantoj, kiuj sin interesas pri tio, ke ili alsendu la solvojn al la administrado de nia gazeto. La nomojn de la solvintoj ni presos kune kun la solvoj mem.

Oni povas ensendi ankoraŭ la solvojn de la rebusoj enpresitaj en la n-roj 2 kaj 3.

Solvoj de la rebusoj trovataj en la N° 1: I. Ruzaj okuloj. — II. Lia superflua sendaĵo. — III. Lingvo Internacia.

Solvis la tri rebusojn: F. Chauffoureaux, N. Pavlovskij, V. Reiner, J. H. Vaňtrik, fr-ino Caroline Wieslander, J. J. Süßmuth, Elbér No, Sam, Karl Ekström, M. M. Abesgus; 2 rebusojn: K. Ŝidlovski, V. Gedroic; 1 rebuson: I. Ŝirjaev.

A N O N C O J.

La nomaro de ĉiuj nun riceveblaj verkoj de la literaturo Esperanta sin trovas en la broŝuro N° 129 (Adresaro, serio XX); oni povas ricevi tiun ĉi broŝuron ĉe D-ro L. ZAMENHOF (Varsovio, str. Dzika N° 9) sendinte ĝian koston aŭ per mono (45 centimoj kun transsendo) aŭ per signoj de poŝto de kia ajn lando (60 c.)

⌘ JUNA HOMO ⌘

(22 jaroj), polo, deziras korespondadi kun ia esperantistino, en celo konatiĝi kun ŝi kaj edziniĝi; plena garantio de silentado; seriozajn ofertojn esperantistinoj povas sendadi laŭ la sekvanta adreso: Russie, Vologda, al Aleksandro Zakrĵevski, agento de la lingvo Esperanto, strato Roščenskaja uĝol Galkinskoj, domo de Kirŝina; por sinjoro **

Restantaj jarkolektoj de „Lingvo Internacia“ 1899 (malgranda nombro) estas riceveblaj ĉe mi. Kosto: svedaj kronoj 1.50 = francoj 2.—

Hjalm. Bäckström

Örnsköldsvik (Suède).

UNU HOMO (28 jaroj), doktoro-advokato en Sofia (Bulgarujo) deziras korespondadi kun ia juna fraŭlino-esperantistino en celo konatiĝi kun ŝi kaj edziniĝi; plena garantio de silentado; seriozajn ofertojn esperantistinoj povas sendadi al adreso: **D-ro Diodono, por s-ro Z...**